

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-o 45, 14. aug. 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

La Mondfesto de Esperanto.

Brila Sukceso de la Dektria en Praha. — La Dekkvara en Helsinki.

Praha!
Nenia vorto aŭdiĝis dum la lastaj monatoj tiel ofte el la buŝo de la esperantistoj, neniu vorto vidigis tiel ofte en la esperantista gazetaro.

Praha! Vi, la gastiganta urbo de nia nunjara mondfesto! Vi, la impona ĉefurbo de nove vekiginta ŝtato! Efektive vi estis inda akcepti la XIII-an Universalan Kongreson Esperantistan!

Post la ĉarma antaŭfesto en Dresden, vi donacis al ni vere belegajn tagojn de ĝojo kaj ĝuo kaj amika samideaneco.

Kiam ni forlasis Dresden'on sabaton la 30-an de julio, sub la adiaŭaj salutoj kaj bondeziroj de la Dresden'a geamikaro, ni estis plenaj je scivola malpacienca.

Tro malrapide kuris la speciala vagonaro, kiu nin portis al la limo de Ĉeĥoslovaka Respubliko.

En Tetschen (Deĉin) ni devis halti, pasi tra la limkontrolo, revizigi niajn pasportojn kaj ŝanĝi la vagonaron. Poste ni ekveturis plue kaj atingis Praha'n je la malfrua posttagmezo.

La akcepto en la Wilson-a stacidomo en Praha ne estis tiel entuziasma kaj la aferoj tie ne disvolviĝis tiel orde kiel en Dresden. Sed oni devas konsideri, ke la tasko de la Prahaj samideanoj estis eksterordinare malfacila. Ili estis kalkulintaj je 700-800 partoprenantoj al la kongreso, kaj jam estis 2500! Kia laborego estis necesa por prepari tian kongreson, por zorgi pri loĝigo de tiom da personoj en mallonga tempo, tion povas ĉiu facile imagi.

Pasinte tra la stacidoma kontrolo, ni devis en stacidoma atendejo ricevi niajn kongresdokumentojn kaj loĝigkarton kaj fordoni nian pasporton. Kvankam la oficiala Akceptejo troviĝis sur insulo Zofin (elp. Jofin) en rivero Moldavo (ĉeĥe Vltava), la samideanoj de Praha opiniis konvene — pro komplezo al la kongresanoj —, instalii provizoran akceptejon en la stacidomo mem. Tamen la aranĝaĵoj tie ne bone funkciis. Ĉio estis tiel neperfekta, ĉio disvolviĝis tiel senorde, ke okazis vera batalado pro ricevo de la dokumentoj.

Esperable tiu okazo estas instrua averto por la aranĝantoj de la venontjara esperantista mondfesto, kiam la nombro de la partoprenantoj eble estos ankoraŭ pli granda.

Nu, kiu persistas en batalo, fine venkos. Ankaŭ ni venkis post ĉ. du horoj da atendado kaj ĝojigite — pro la fina liberiĝo el la interpretado kaj batalado — povis eniri la belan urbon.

Sur insulo Zofin jam regis vigla vivo. Okazis la unua kunveno de esperantistoj el malgrandaj nacioj, en kiu interalie parolis redaktoro Vilho Setälä el Helsinki pri Finnlando.

Kvankam ankoraŭ ne estis la oficiala interkonatiga vespero, oni jam renkontis multajn konatojn kaj konatiĝis kun ĝis tiam ankoraŭ nekonataj gesamideanoj.

Ne forgesi mi volas la afablan helpon, kiu mi havis tiuvespere de ĉeĥa samideano, f-ino H. el Viškov, kiu plezure interpretis al mi la nur ĉeĥe presitan mangokarton; alle mi eble estus mendinta belegan menuaĉon, ekz. fiŝon kun kompoto aŭ rizon kun kukumoj. Per la kompleza helpo de la ĉeĥa samideano mi do ricevis manĝeblan vespermanĝon.

La unua kongrestago.

(Dimanĉo, 31. julio.)

Malferma kunsido. — Interkonatiga vespero.

Post kiam matene kunsidis Konstanta Kongresa Komitato kaj Lingva Komitato kaj okazis elekto de naciaj delegitoj salutontaj la kongreson, je 3 h. posttagmeze en salonego „Smetana“ de Reprezenta Domo*) la potencaj sonoj de la „Espero“, ludita de ĉeĥa organa virtuoza prof. Wiedermann, anoncis la malfermon de la kongreso.

Ĉeestis pli ol du mil esperantistoj, reprezentantoj de la ĉeĥoslovaka registaro, de la urbestro de Praha, de diversaj eksterlandaj registaroj, de gravaj internaciaj institucioj kaj de la eŭropa gazetaro („Prager Presse“ mencias jenajn journalojn:

anglaj: Daily Telegraph, Westminster Gazette, Manchester Guardian, North Mail; holanda: De Nieuwe Courant; svedaj: Östergötlands Folkeblad, Svensk Handelsstidning; pola: Nasz Rant; danaj: Nationaltidende, Social-Demokraten, Politiken; ĉeĥaj: Tribuna, Nár. Politika, Prager Presse; kaj la esp. gazetoj).

S-o Isbrücker, kiel prezidinto de la kongreso en Hago, malfermas la kongreson dezirante al ĝi multan sukceson. Li memorigas pri la morto de nia fama poeto kaj akademiano Antoni Grabovski, kies membron la kongreso honoras per levigo.

Oni elektas honoran prezidantaron de la kongreso: generalo Sebert (ne ĉeestas pro sia ago), ĉsl. ministro Šusta kaj vicurbestro de Praha ing. Rotnagl.

Efektivan prezidantaron oni elektas: prez. d-ro Kamaryt, vicprez. d-ro Arnhold kaj Warden, sekr. Pitlik, vicsekr. s-ino Cense kaj f-ino Šupichova.

D-ro Kamaryt transprenas la prezidon, dankas sincere pro la honoro, legas salutan leteron de gen. Sebert, bonvenigas s-inon Klara Zamenhof bruege aplaudatan kaj salutas la oficialajn reprezentantojn.

La oficiala reprezentanto de la ĉsl. registaro, instruminstro d-ro Šusta, diras*), ke la ĉsl. registaro alte ŝatas la okazigon de la kongreso en la renoviĝinta ŝtato Ĉeĥoslovakio, en malnova urbo Praha. Li opinias, ke la estonteco montras, kiel genie konstruita lingvo anstataŭas historiajn lingvojn en rilatoj internaciaj, t. e. kiel superregos spirito de racionalismo la spiriton de tradicionalismo. Ĉiukaze la esp. movado estas rimarkinda, ĉar plej grava problemo de l' homaro estas serĉi daŭran bazon de paco, kaj por tio la esp. movado povas esti kuneffikanta tre grava. El la ĉeĥa nacio, kiu de ĉiam laboris por la idealo de paco, devenis ankaŭ granda pioniro de artefarita lingvo Jan Amos Komensky (Comenius). Parolanto deziras sukceson al la kongreso kaj antaŭdiras grandegan resonon de ĝi en ĉsl. ŝtato.

La vicurbestro de Praha ing. Rotnagl prezentis tre varmajn parolojn pri paca kaj libereca idealo de ĉsl. nacio, kiun idealon reprezentas ĉiuj ĉsl. granduloj Hus, Komensky, Palacky, Havliček, Rieger, Masaryk k. a., kiuj celis humanecon kaj fratecon inter la homaro postulante liberecon ne sole por sia nacio, sed por ĉiuj. La dezirataj celoj de la ĉsl. nacio estas proksimaj al tiuj de la esperantistoj, kiuj tial trovas komprenon ĉe la ĉsl. popolo. La kroniko de Praha ĝoje notas kiel honorigan kaj belan okazintaĵon la XIII-an kongreson, kiu kunvenas en la renoviĝanta ŝtato en tempo de emocio kaj ĝoja laboro por la rekonstruo de la ŝtato. La memorindaĵoj de Praha parolos al la kongresanoj pri suferoj kaj malĝojoj, sed ankaŭ pri sopira penado de nacio atingi plej altajn celojn de spirita progreso. Kio estas Praha, tio estas verko de longaj jarcentoj kaj de laboro, sed ankaŭ de forto, de entuziasmo kaj kontraŭstaro. Praha deziras esti serĉata de nacioj, kaj ĝi estas danko, ke la esperantistoj proponas al ĝi siajn helpajn manojn. Praha sekvas kun kompreno la agadon de l' kongreso kaj deziras, ke ĝi en harmonio atingu plenan sukceson.

La vicurbestro finis sian paroladon per kelkaj vortoj en Esperanto: Mi tre bedaŭras, ke mi ne scias Esperanton tiom, ke mi povas eldiri mian ĝojon, kiom mi deziras. Vi sentu vin feliĉajn en nia lando kaj kunportu hejmen bonajn impresojn. Vivu la XIII-a Esp. Kongreso! — La esp. fino de lia parolado elvokis bruan aplaudon.

Nun la prezidanto prof. d-ro Stan. Kamaryt prezentis sian bone pripensitan kongresan paroladon, el kiu ni resumas: La esp. movado estas racionalisma kaj demokratisma. Kvankam ĝi havas ankaŭ sian tre altan idealon. Idealeco estas kaŭzo de niaj sukcesoj kaj estos kaŭzo de nia fina venko. La progreso de nia afero ne dependas de la favoro

*) La tekston de la paroladoj ni represas plejparte el „Prager Presse“, kiu ĉiutage dum la kongreso sub rubriko „Esperantaj informoj el Ĉeĥoslovakio“ aperigis en Esperanto la programon de la tago kaj longan raporton pri la okazintaĵoj de l' antaŭa tago.

de aŭtoritatoj, sed de la laboro de nekonataj kaj sennomaj individuoj same, kiel milita venko ne estas ĉiam verko de generaloj, sed de nekonataj soldatoj. Progreso povas veni sole de malsupre, ne de supre (aplaŭdo). Laboro por Esperanto fariĝis bezono de amema koro, kaj la sukcesoj de Esperanto estas fruktoj de tiu ĉi laboro el amo.

S-o Isbrücker (anstataŭ gen. Sebert) legis raporton de K. K. K.

Poste d-ro Edmond Privat, vicprez. de UEA, sekr. de Ruĝa Kruco kaj direktoro de „Esperanto“, malfermis la samtempan VII-an kongreson de UEA per ideoriĉa kaj belforma parolado, kiu prave estis entuziasme aŭskultata kaj aplaudata.

Li dankas al la aranĝintoj de la kongreso pro la granda laboro kaj esprimas estimon al la regno, kie okazas la kongreso. Li konstatas, ke tiu ĉi malnova kaj glora ŝtato, kiu en la historio ludis noblan rolon, restariĝis per sensanga revolucio kaj rekonstruiĝas kun saĝeco en trankvilo. La herooj de Ĉeĥoslovakio ne estas generaloj, sed pensuloj, kiuj apartenas ne sole al la ĉeĥa nacio, sed al la tuta mondo, kiel Hus kaj Komensky. En illa fronto estas belaj talentuloj, respektindaj Masaryk kaj modesta Beneš, ambaŭ famaj sciencistoj. Ĉeĥoslovakio estas ekzemplo de trankvila ŝtato kun saĝa leĝaro, per kiu ĝi sen sangoplenaj bataloj solvis gravajn problemojn nacian kaj socian. Li ne povas deteni la impreson, kiun li havis, kiam la Ligo de Nacioj traktis pri akcepto de Aŭstrio en la Ligon kaj pri helpo al Vieno. Modesta kaj saĝa, pli saĝa ol aliaj pli maljunaj diplomatoj, ministro Beneš leviĝis unua por diri, ke oni devas helpi al Vieno kaj Aŭstrio. Parolanto komplimentas la ĉeĥojn, ke ili havas tiel noblajn homojn. Poste li parolas pri la celoj kaj faroj de UEA komparante ĝian laboron en paca tempo al la laboro de Ruĝa Kruco en milito. Li parolis pri senco de nova kulturo de homaro super nacioj, kiu kulturo bezonas nian lingvon. Li finis per saluto al Ĉeĥoslovakio vokante ĉeĥojn: At zije Československo (Vivu Ĉeĥoslovakio!).

La parolado de Privat estis parolado de koro, de koro komprenanta ĝojon kaj malĝojon de aliaj.

Laŭ propono de d-ro Privat oni decidis sendi salutajn telegramojn al prezidanto Masaryk kaj ministro Beneš.

Multan aplaudon vekis la legado de saluta letero de ministro por eksterlandaj aferoj d-ro E. Beneš. La ministro skribis:

Estas por mi neordinara ĝuo, ke mi povas tie ĉi saluti internacian esperantistan kongreson, kiu signifas novan valoran iniciaton sur la kampoj de spirita proksimiĝo de la nacioj. Mi bonvenigas ĝin speciale pro tio, ke en la nunajn postmilitajn cirkonstancojn ĝi enportas la noblan devizon pri kunlaboro de l' nacioj. La ideo pri unu interkompreniga lingvo, kia estas Esperanto, estas valora por ĉiuj sinceraj pacifistoj. Hodjaŭ ĝi ne estas plu utopio; sed problemo, pri kiu laboras inteligentularo de l' tuta mondo. Estas tre agrable por mi, ke la nunjara kongreso okazas en Praha, kaj ke ĝiaj partoprenantoj povas konvinkiĝi, kiel nia ŝtato, en kiu de ĉiam estis viva la ideo de pacifismo, estas trapenetrita per varmega sopiro je paca kunlaboro de ĉiuj nacioj de bona volo. Mi esprimas deziron de plena sukceso al ĉiuj kongresaj laboroj. Mi certigas vin, ke mi subtenados per ĉiuj fortoj la ideon pri Esperanto.

Okazis mallonga paŭzo, post kiu salutis la kongreson la oficialaj delegitoj de diversaj registaroj, t. e. reprezentanto de belga ministro por scienco kaj arto (s-o Frans Schoofs), de finna instrua ministro (Vilho Setälä), de hispana milita ministro (majoro Jul. Mangada), de itala ministro por maraferoj (kom. A. Alessio), de litova ministro por financaj, komercaj kaj industriaj aferoj (v. Medem), de nederlanda ministro por instruado kaj scienco (Sevenhuysen), de saksaj ministro por ekonomio (d-ro Wicke), de ukraina misio en Praha (d-ro Boczkowski), de Saksaj Esperanto-Instituto (d-ro Dietterle) kaj de Ligo de Nacioj (s-o Fujisawa kaj poste la vicsekretario de la Ligo d-ro Nitobe).

*) Domo por reprezentanti, ne domo de reprezentantoj.

D-ro Nitobe parolis angle kaj estis interpretata de d-ro Privat. Li diris interalie, ke la tradicio de Esperanto bezonas longtempe por detruo la tradicion de l' milio. Li kredas, ke Esperanto estos iam la lingvo de la Ligo. La tago venos, kiam Esperanto venkos. Plezure li vidas la multajn delegitojn reprezentantajn pli ol 40 naciojn. Li ĝoje konstatas, ke regas unueco inter ili, kaj ke la unueco helpas al la celo. Li dankas pro la afabia akcepto.

Nun salutis la kongreson en rapida sinsekvo la delegitoj de la reprezentataj nacioj:

Urugvio: s-o Legrand
 Algerio: s-ino Tiard
 Aŭstralio: s-o Hudson
 Aŭstrio: s-o Simon
 Belgio: f-ino Jennen
 Brita Imperio: s-o Currie (anglo)
 s-o Kennedy (skoto)
 s-o Edwards (kimro)
 pastro Parker (iro)
 Bulgario: s-o Kolev
 Ĉeĥoslovakio: s-o Eiselt (ĉeĥo)
 s-o Scholze (germano)
 s-o Blicher

Danlando: s-o Setälä
 Finnlando kaj Estonio: s-o Archdeacon
 Francio: s-o Macan
 (Blinduloj): s-o Ketterling
 Danzig: s-o Heller
 Hebrea nacio: prelat Glesswein
 Hungario: d-ro Steche
 Germanio: s-o de Allende
 Hispanio: d-ro Filippetti
 Italio: s-o Narita
 Japanio: s-ino Kellert (kroatino)
 Jugoslavio: s-o Klajic (serbo)

Kanadio: s-o Bratley
 Nederlando: s-o Isbrücker
 Polio: s-o Belmont
 Rumanio: s-o Ce
 Norvegio: s-o Bonnevie
 Litovio: s-o Klimas
 Svedio: s-o Hedström
 Svislando: s-o Stettler
 Ruslando: s-o Anofrijev
 (Frankfurta foiro: s-o Kreuz).

Post la 7-a horo finiĝis la solena manifestacio en ĝenerala entuziasmo.

Vespere okazis interkonatiga vespero sur insulo Zofin, dum kiu tamen oni povis interkonatiĝi nur kun malgranda parto de la kongresanoj, ĉar la nombro estis tro granda. Tie ankaŭ la redaktoro de ET konatiĝis persone kun multaj el siaj kunlaborantoj kaj korespondantoj, kiujn li ĝis tiam ne konis persone.

La dua kongrestago.

(Lundo, 1. aŭgusto.)

La unuaj laborkunsidoj. — Vizito al la oficejo de la Foiro de Praha. — Vespera koncerto en Reprezenta Domo.

Brile sukcesis la malferma kunsido de la XIII-a, kun kiu estis kunigita la malferma kunsido de la VII-a kongreso de UEA.

Lundo komenciĝis per laborkunsido de UEA. La prezidanto s-o Stettler malfermis la kunsidon je 9.30 h. Li komparis la nombron de la partoprenintoj en la kongreso de Hago — kie la kongresanojn oni nombris je centoj — kun tiu de Praha — kie oni ilin nombras je miloj. Li atentigis pri la historio de la urbo Praha ktp. Li elparolis, ke nia movado ne estas oficiale paca movado, sed ke tamen la interna sento de nia movado akcelas la pacon. Li memorigis, ke dum la pasinta jaro UEA perdis 61 membrojn pro la morto.

La ĝen. sekr. de UEA, s-o Hans Jakob, donis la ĵaran raporton, menciante nur la ĉefajn punktojn, ĉar la raporto mem troviĝas presite en la manoj de ĉiu kongresano.

Poste okazis longa debato pri respond-kuponoj, diskutoj pri ĵarlibro de UEA, pri malhonestaj interŝanĝemuloj, pri BES-a adresaro, pri „Esperanto“ ktp.

D-ro Privat, direktoro de „Esperanto“, plendis pri tro multe da presotaj petoj, alvokoj ktp. Li prave diris, ke ilaj petoj kaj alvokoj pro sia troeco ne plu estas legataj kaj ne plu efikas, kaj ke en estonteco li devas aŭ tute ne aŭ nur mallongigitajn ilin presi. (La redaktoro de ET povas plendi pri la sama malbonaĵo. La petoj aŭ alvokoj forprenas multe da loko kaj efikas nur malmulte. Do li plene aliĝas al la opinio de la direktoro de „Esperanto“).

Fine oni elektis kvar honorajn membrojn de UEA: s-ino Klara Zamenhof, kiu persone ĉeestis, s-o Charles el Béziers, s-o Blaise el London kaj s-o Rockmann el Magdeburg.

Tagmeze la esp. reprezentantoj de la foiroj de Barcelona, Paris, Lyon, Milano, Frankfurt kaj la redaktoroj de „Internacia Komercia Revuo“ kaj ET vizitis la oficejon de la Foiro de Praha en la malnova urbdomo por interŝanĝi opiniojn kaj konsilojn. La vizito donis bonajn rezultojn kaj tre kontentigis la interesatojn.

Posttagmeze je 3.15 h. d-ro Kamaryt malfermis la unuan laboran kunsidon de la XIII-a.

D-ro Zirkel salutis la kongreson en la nomo de Politekniko Čiŝhen, s-o J. M. de Villa kiel reprezentanto de la samideanoj de insulo Kuba.

Prof. d-ro Cart, prez. de la Esp. Akademio, alparolis la kongresanojn, plendante pri malbona vizito de la kunsido de L. K. kaj petante pri respekto al la lingvo.

S-o Pitlik legis nove alvenintajn salutleterojn kaj telegramojn, interalie de la honora komitato de la XIII-a (ĉsl. registaro), de grupoj aŭ samideanoj el Tokio, Vladivostok, Habana, Alexandria, Celebes, Buenos Aires, Mondevideo, Konstantinopolo, de s-ino Zamenhof, de Leono kaj Feliks Zamenhof, de CO en Genève, de d-ro Mybs, de s-ino Moscheles, de s-o Blöndal el Hvammstanga (Islando), de ges-oj Krestanoff kaj de Foiro de Padova.

La delegito de la Ligo de Eksmilitistoj legis salutleteron de s-o Henri Barbusse, kiun ni publikigos aliloke. La letero elvokis bruan aplaudon.

S-o Page nun prezentis la raporton de la komisiono por esplori la organizan demandon. La diskuto pri ĝi oni prokrastis al la dua laborkunsido.

Poste oni diskutis pri sekvantaj proponoj:

Projekto pri monumento al d-ro Zamenhof (proponanto s-o Applebaum); oni aprobis la projekton.

Enkonduko de Esperanto en lernejoj (proponata en nomo de Pola Esp. Societo de s-o Mergel); pri tiu temo oni multe diskutis. Oni akceptis proponon de d-ro Privat, ke la kongreso sendu telegramon al Ligo de Nacioj, por ke ĝi rekomendu al siaj anoj la ekzamenon de la demando, kaj alian telegramon al la ĉsl. registaro, ke ĝi proponu la enkondukon de Esperanto en lernejoj (kiel nedeviga fako) en la proksima kunveno de Ligo de Nacioj. Krome oni akceptis proponon de d-ro Arnhold, ke la kongreso interrilatu kun la naciaj asocioj, por ke ili elektu komisionojn, kiuj sin turnu al la ministerioj de sia lando.

Diskutado pri kelkaj aliaj proponoj estis prokrastata al posta kunsido.

La lunda vespero estis dediĉita al plezuro: oni vizitis koncerton de la Akademio de la ĉeĥa kant- kaj muzik-arto, korpa eduko kaj naciaj dancoj.

En gazeto de Praha ni legis la noton: Ni ne scias, kiel niaj gastoj juĝas pri la koncerto, kaj ni ne volas juĝi nian laboron.

Por diri la veron, la koncerto surprizis nin per sia boneco kaj beleco. Eĉ por delikataj oreloj kaj okuloj la programo estis eksterordinara ĝuo kaj meritas plenan laŭdon. Ni nur mencias la belegan harpoludon de majstro Klička kaj la ekzercojn de sokoloj kaj sokolinoj (gimnastoj). La ĉarmaj melodioj eĉ akompanis nin en la songo kaj plibeligis nian dormon.

La tria kongrestago.

(Mardo, 2. aŭgusto.)

Fakaj kunsidoj. — Vizitoj al vidindaĵoj. — Internacia kostuma balo.

Ministro Beneš ĉe festeno de UEA.

Mardon oni sentis, ke oni ĉeestis kongreson de kongreso. Sur granda tabulo antaŭ la eniro al la Akceptejo estis indikitaj dudeko da diversaj fakaj kunvenoj. Kompreneble estis tute neeble por unuopa persono viziti ĉiujn aŭ eĉ nur kelkajn el ili. Mi vizitis tiun kunvenon, por kiu mi havis plej grandan intereson: la komercistan. Ĝi estis vizitata de pli ol 60 personoj, daŭris pli ol tri horoj kaj pritraktis tre seriozajn kaj interesajn demandojn. Oni elektis komisionon por studi la komercan organizan demandon: s-oj Tell el Stockholm, Kreuz el Frankfurt, Gill North el Barcelona, Saggioli el Padova kaj Unger el Zürich.

Pri aliaj kunsidoj ni publikigos apartajn artikolojn, se ni ricevos raportojn, en venontaj numeroj.

Posttagmeze okazis vizitoj al vidindaĵoj de Praha sub sperta gvidado de Prahaj samideanoj. Mi tamen preferis iri mian propran vojon, ne rigardi ĉiom kaj nur suprate sed nur lom kaj des pli funde.

Antaŭ ĉio min allogis la transa bordo de l' rivero Vltava, kiun superstaris sur larĝa altaĵo „Hradčany“, la antikva kastelo de la iamaj bohemiaj reĝoj kun la katedralo.

Por trovi ĝin, oni ne bezonas urboplanon. Per iu el la multaj pontoj oni atingas la transan bordon, per iu el la altiĝantaj stratetoj oni trovas, preskaŭ senvole, la altaĵon, sur kiu estas konstruita la komplekso de palacoj, domegoj, preĝejoj ktp.

Kaj nun mi staras sur la plej alta punkto alirebla por fremdulo, sur la galerio de la katedrala turo, kaj miaj rigardoj direktiĝas malsupren por ĉirkaŭi la grandiozan panoramon de la vasta urbejo, kiu etendiĝas tie profunde sub miaj piedoj trafluante de la argentonda rivero, kun cent turoj kaj turetoj, kun palacoj kaj preĝejoj, kaj kun serena brilanta suno super si. Vere, admirinda vi estas, Praha! Mankas vortoj por sufiĉe laŭdi la belegcon de via panoramo. Prave la ĉeĥoj fieras pro vi.

Nur nevolonte oni forlasas tiun fabelan elvidejon kaj ree iras malsupren sur la 279 ŝtupoj de l' alta turo.

Poste mi vizitis ankoraŭ kelkajn trezorejojn, salonojn, muzeojn ktp., kies priskribo forprenus tro multe da loko, kaj fine direktis miajn paŝojn al la Reprezenta Domo, por partopreni la internacian kostumbalon.

Pri la balo nur kelkajn vortojn. Ĝis la 12-a noktmeze mi sidis sur galerio, ne dancante sed nur rigardante la multekoloran bildon en la salonego sub miaj piedoj. Precipa ĝuo por la okulo estis la prezento de bohema nacia danco „Beseda“, kiun montris speciala ĉeĥa kostuma grupo, grandparte gesamideanoj el ĉiuj anguloj de la ĉeĥoslovaka respubliko. Kaj la holandaj, skotaj, svedaj, hispanaj, italaj, serbaj k. a. kostumoj alportis ankoraŭ pli multe da koloroj, ankoraŭ pli viglan vivon en la moviĝeman bildon de la gedancantoj.

Nur post la granda paŭzo, t. e. post la unua nokte, mi malsupreniris por partopreni la dancadon, kaj amuziĝis kun la aliaj ĝis la frumateno.

Mardon vespere la estraro de UEA aranĝis en hotelo Palace vesperon por mallarĝa rondo de oficialaj personoj, en kiu partoprenis ĉeĥoslovaka ministro por eksterlandaj aferoj d-ro Eduard Beneš, ĝen. vicsekretario de Ligo de Nacioj d-ro Nitobe, reprezentantoj de Ruĝa Kruco s-o Horner kaj de Internacia Laboroficejo s-o Blumel, la komitato de UEA kaj kelkaj aliaj personoj.

Pri tiu vespero raportas „Ĉeĥoslovaka Gazeto“ en speciala eldono de 5. aŭgusto jenon:

La vicprezidanto de UEA d-ro Edmond Privat france salutis ministron Beneš kaj elokvente esprimis sian laŭdan opinion pri Ĉeĥoslovakio kaj pri faroj de Beneš, speciale pri paca penado de la ĉeĥoslovaka politiko en centra Eŭropo. Li akcentis la analogion inter celado de ĉeĥoslovaka nacio kaj ideo de esperantismo, kiuj ambaŭ penas pri proksimiĝo kaj fratigo de nacioj. Li salutis s-ojn Nitobe, Blumel kaj Horner akcentante la similecon de ideoj de la organizaĵoj reprezentataj de ili kaj tiuj de esperantistoj.

D-ro Beneš respondante france atentigis pri tio, ke en ĉeĥoslovaka respubliko estas disvastiĝita profunda kredo je la idealismo kaj je la movado, en kiu montriĝas granda sindono al la afero, kiel estas en esperantista movado. Tiu ĉi movadon ni ĉiuforte subtenados. Li bonvenigas la esprimon de d-ro Privat pri la ĉeĥoslovaka politiko, en kiu karakteristika estas monda optimismo, kun kiu oni laboras por la sukceso de la afero. En tiu idealismo, sindono kaj konvinko de ĉeĥoslovakoj pri reformo de l' homaro konsistas jena granda ideo enhavata en la esperantismo. Estas necese unuigi la penadon de ĉiuj, kiuj volas labori por rekonstrui Eŭropon. Ĝi estas universala penado, per kiu estas trapenetrata la esperantista movado kaj la tuta tradicio de la ĉeĥoslovaka nacio. La ministro tostis por sukceso de tiu ĉi penado kaj de la esperantista movado.

D-ro Nitobe bonvenigis la internan ideon de esperantismo, kiun li rigardas kiel grandegan forton por efektiviĝi la idealon de Ligo de Nacioj.

S-o Pitlik esperante kaj ĉeĥe dankis al ministro d-ro Beneš kaj al ĉsl. registaro pro la helpo donita al la kongreso kaj al ĝiaj aranĝantoj.

Post la tostoj ministro Beneš adiaŭis la ĉeestintojn, kiuj post vespermango iris partopreni la internacian balon en Reprezenta Domo.

La kvara kongrestago.

(Merkredo, 3. aŭgusto.)

Dua laborkunsido de la XIII-a kaj de UEA. — Teatra prezento.

La dua laborkunsido de la XIII-a komenciĝis en preskaŭ malplena salono, kiu nur lom post lom plipleniĝis. Estis granda ĝojo, revidi s-inon Zamenhof en la kunsido: efektive ŝi estis regula kaj fervora vizitantino de ĉiuj kunsidoj kaj povus servi kiel modelo por la plimulto de la kongresanoj, kiujn ŝajne tute ne interesis la laborkunsidoj.

Sola punkto de la tagordo de l' hodiaŭa kunsido estis la organiza demando.

Antaŭe oni legis pluajn, nove alvenintajn salutetojn, interalie de s-ino Hankel, de Zanon kaj de Hungarlanda Esp. Societo en Budapeŝt.

S-o Page prezentis raporton de la komitato elektita en Hago por la unuigo kaj reorganizo de niaj organizaĵoj. La raporto estis jam prilaborita dum kunvenoj de la komitato en Dresden. Ĝi proponas fondi Universalan Ligon Esperantistan (ULE), kiu unuigu ĉiujn ĝis nun ekzistantajn esp. organizaĵojn kaj instituciojn, tamen konservante la propran karakteron de ĉiu unuopa el ili.

Oni multe diskutis pri tiu gravega afero. Longan paroladon faris s-o Alessio. Respondis al li s-o Warden. Partoprenis en la diskutado s-oj Kronenberg, Arnhold, v. Frenckell, Belmont, Degen, Privat, Mahn kaj Mielert. Fine la prezidanto d-ro Kamaryt povis konstati, ke oni alvenis al plena konkordo: Regularo estos redaktata en spirito de unuigo inter CO kaj UEA, kies projekto aperos en Oficiala Gazeto kaj eventuale ankaŭ en aliaj esp. gazetoj. La gazetoj okazigos publikan diskuton pri la temo, kaj en venonta kongreso la demando estos decidata.

Kiam oni estis diskutanta plej vigle, eniris s-o Habrman, ĉsl. eksministro por instruado. Li salutis la kongreson — en ĉeĥa lingvo, interpretata de d-ro Kamaryt —, bedaŭrante, ke li ankoraŭ ne parolas Esperanton, sed dirante, ke li ĉiam penis helpi al la esp. movado. Li ne nur simpatias al Esperanto, sed montris per faktoj sian esperantemon. Estante ministro, li permesis la esp. instruadon en ĉiuj lernejoj, kie ekzistis esp. instruistoj kaj esperantemaj lernantoj. Li promesis, ankaŭ estonte helpi laŭpove al ni, ĉar Esperanto estas unu el la plej taŭgaj rimedoj por alproksimigi la popolojn.

En la nomo de la kongreso respondis al li d-ro Kronenberg, dankante la ministrojn pro lia granda intereso por Esperanto.

Posttagmeze okazis la dua laborkunsido de UEA, kiun mi bedaŭrinde ne povis ĉeesti kaj pri kiu mi ankaŭ ne sukcesis ricevi informojn.

Ankaŭ la teatron prezentadon „Nokto en Karlštejn“ en teatro de Vinohrady mi ne ĉeestis; sed mi aŭdis, ke ĝi sukcesis kontentige kaj ke la aktoroj (neprofesiaj dilektantoj) penis ludi kiel eble plej bone.

La gazetoj de Praha mem konfesas, ke „Nokto en Karlštejn“ ne estas la plej taŭga komedio de la fama ĉeĥa verkisto Jaroslav Vrchlicky; do, ŝajnas, mi ne multon perdis per tio, ke mi ne ĉeestis la prezentadon.

La kvina kongrestago.

(Ĵaŭdo, 4. aŭgusto.)

Ekskursoj al Moravia Karsto kaj al Karlštejn.

Dum la unuaj kongrestagoj briladis la suno nekompate akre de la ĉielo. Regis preskaŭ tropika varmego. Kelkaj nordlandaj samideanoj, ne povante suferi ĝin, jam estis forveturintaj la duan aŭ trian kongrestagon.

Sed en la lasta nokto eksplodis fulmotondro, kaj la ĵaŭdo estis kaj restis freŝa, malvarmeta.

Granda ekskurso estis projektita al Moravia Karsto por viziti faman abismon de Macoĥa kaj konatajn grotajn tie, kiuj prezentas unu el la plej fabelaj mirakloj de la mondo. Tamen, ŝajnas, la ekskurso ne estis taŭge organizita, ĉar la ekskursintoj estis parte algrade seniluzigitaj. La alvojaĝo daŭris kvin horojn per fervojo, poste oni devis daŭrigi la vojaĝon aŭtomobile. Dum la revojaĝo oni devis resti tri horojn en la vagonaro, antaŭ ol ĝi ekveturis, tiel ke oni revenis al Praha nur je vendredo matene. Ankaŭ por manĝado estis malbone zorgite, kaj la ekskurso postulis tre altajn kostojn.

Kelkaj partoprenintoj forte plendis la alian tagon pri la aranĝo, ekz. iu brita samideano diris en publika kunsido, ke li jam havas pli ol 60 jarojn kaj ke li multon spertis en sia vivo, sed ke li neniam spertis ian similan fuŝaĵon.

Male, aliaj pli junaj kaj pli fortikaj samideanoj estis plene kontentaj, ĉar la stalagmitaj kaj stalaktitaj grotaj laŭ subttera rivero Punkva estas efektive mirigaj kaj ne havas konkurantojn en tuta Eŭropo tiel, ke la penoj, kiujn oni havis por atingi la grotajn, estis riĉe rekompencataj per la granda ĝuo vidi tian miraklon.

Pro diversaj kaŭzoj, unue ĉar mi estis tre laca pro la vizito al la kunsidoj la antaŭajn tagojn kaj pro la verkado de raporto, kaj due ĉar mi supozis iomete pri la malfacilaĵoj kaj penoj kunligitaj kun la ekskurso al Moravia Karsto, mi ne partoprenis tiun ekskurson, sed preferis kun mia fratino aliĝi al la alia grupo de ekskursantoj, kiuj volis viziti la kastelon Karlštejn (ĉeĥe Karluv Tyn). Tiu ekskurso estis tute senpena. Per la fervojo oni veturis preskaŭ ĝis al la plejo de la kastelroko. La roko mem ne estis tre alta, sed ĝi kuŝis pitoreske inter aliaj pli altaj arbarumitaj montoj.

La kastelo estis interesa pro ĝia mezepoka arkitekturo kaj ĝia internaĵo, kiu nun estas muzeo. Speciale interesa estis profunda puto. Oni funkcigas ĝin per grandega rado, kiun eniras kelkaj viroj; per konstanta irado ĝi movas la radon kaj bezonas dek minutojn por suprentiri la sitelon. La kastelo Karlštejn (t. e. ŝtono aŭ roko de reĝo Karlo) estas tiu loko, pri kiu temas la historio de la kongresa teatralo.

Dum la ekskurso al Karlštejn s-oj Ro-So kaj Grenkamp kolektis 122 ĉ. kronojn por la blinduloj.

(Finota.)

En 1922 ni iros al Helsinki.

Kopenhago, Danzig, Wiesbaden, Marseille, Milano, Varsovio, Helsinki — jen la urboj, pri kiuj oni parolis kiel pri „kandidatoj“ por la venonta kongreso. Fine oni decidigis por Helsinki. Pri la estigo de tiu decido oni legu en nia venonta numero.

Tekniko.

En Estonio en Tallin estas farita eltrovo ĉe senfadena telegrafo, per kiu la granda anteno estas anstataŭigata per la aparato, kiu pro sia

malgrandeco povas esti metata en poŝon. Forigon de la anteno ebligas la laŭtigilo, laŭtiganta la sonojn ĝis 25 000 oble. Oni provis ĝin, akceptante telegramojn el Nauen, Paris kaj London. Same oni akceptis ankaŭ parolon de senfadena telefono el Berlin. Dum tutlanda agrikultura kaj industria ekspozicio (10.—19. septembro) la eltrovaĵo estos ekspozata.

Internacia Kongreso de la intelekta Laboro

Bruselo 20.—22. aŭgusto 1921.

La Unuiĝo de la Internaciaj Asocioj invitas por partopreni en Internacia Kongreso en Bruselo, la 20-an, 21-an kaj 22-an de aŭgusto nunjara la intelektajn laboristojn, la de ili starigitajn organizaĵojn por la defendo de iliaj rajtoj, kaj ankaŭ la reprezentantojn de la gravaj institucioj sciencaj, artaj, literaturaj, moralaj kaj religiaj.

Tiu kongreso pritraktos ses demandojn:

1. Ekzameno de la vivkondiĉoj de la intelekto kaj de la intelektuloj en la nova societordo. Ŝajnas neeble ke, en la movado de restarigo flegata en ĉiuj landoj, restu pli longtempe malzorgata la grava parto cedota al la agemo kaj al la rajtoj de la intelekto, rilate al la favoroj kaj profitoj certigitaj al la kapitalo kaj al la manlaboro.

2. Protekto de la interesoj profesiaj, fakgrupaj kaj privataj por la intelekta laboro. Tiu protekto de la personoj tamen ne povus malutili la socian rolon kaj la liberan influon de la intelekto en la fako de la sciencoj, literaturo kaj artoj, moralo kaj edukado, tiaj kiaj ili estos organizotaj de la publikaj potencoj kaj de la asocioj kun senproftaj celoj. Iuj grupoj sin okupis jam pri tiuj problemoj en diversaj landoj, kaj naciaj societoj fondiĝis por ilin pritrakti; sed ili ne ankoraŭ havis okazon por interkonsiliĝi. Estas necese ekzameni la utilon pli multigi tiujn asociojn kaj krei iun internacian ligilon inter ili.

3. Problemo pri presadoj kaj gazetaro. La intelektulo estas serioze minacata rilate la disvastigon de la elpensadoj kaj la esprimon de la ideoj, pro la malhelpoj, kiujn la nuntempaj ekonomiaj vivkondiĉoj estigas al la publikigiloj.

4. Kunmeto de agada plano. La kongreso havos la okazon por verki tabelon de la grandaj progresoj kaj celoj, al kiuj la menso devus direkti la homajn klopodojn dum la proksima estonteco.

5. Studo de la problemoj pri Ligo de Nacioj. Laboristaj, ekonomiaj aŭ financaj konferencoj prezentis rezoluciojn, eĉ postulojn pri la Ligo. Rekomendoj laŭ vidpunktoj scienca, teknika, morala kaj edukiga ŝajnas oportuna.

6. Loko rezervota en la Ligo de Nacioj al la intelektulo, same kiel oni donis jam al la manlaboro kaj al la financo.

La preparoladoj de la kongreso pri tiuj ses temoj estos preparataj enquete kaj raportoj estos disdonataj antaŭ la kunveno.

La kongreso okazos dum la komenco de la „Internaciaj Semajnoj“ (20. aŭg. ĝis 15. sept.), dum kiuj kunvenos en Bruselo, en la Monda Palaco, diversaj internaciaj kongresoj, kaj okazos la dua kunsidaro de la Internacia Universitato.

La kongresana kotizaĵo estas 20 fk.

Ni memorigu ke la Unuiĝo de la Internaciaj Asocioj celas kunordigi la grandajn internaciajn movadojn, kunlaborigi inter si la organizaĵojn, kiuj direktas tiujn movadojn, starigi internacian centron por iliaj konstantaj institucioj. — La Unuiĝo estas fondita en 1910. — Antaŭ la milito 230 internaciaj asocioj aliĝis al ĝi. En 1920 cento de tiuj restarigitaj organizaĵoj partoprenis en la 3-a Monda Kongreso. La Unuiĝo kaj ankaŭ la Internacia Centro havas sian sidejon en Bruselo, en la Monda Palaco (Parc du Cinquantenaire), disponigita de la belga registaro.

Tradukita por la Esperantista Gazetaro de „Gazetara Servo“ de Belga Ligo Esperantista, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen.

FRANS SCHOOF, Direktoro.

Internacia Esp. Servo.

(En la intereso de la esp. propagando estas dezirinde, la artikolojn sub tiu ĉi rubriko traduki kaj represi en naciaj ĵurnaloj, aldonante la vortojn „Internacia Esperanto-Servo“ kaj sendante 1—2 ekzemplerojn de la koncerna ĵurnalo al la redakcio de ET.)

LETERO EL BULGARIO.

Karlovo, 1. aŭg. 1921.

Kiel ĉie en la mondo post la tuthomara kaptismo la vivkareco vastiĝis ankaŭ en Bulgario, unu el la plej malkaraj landoj en la mondo, kie la prezoj estis fabele malaltaj. Nun la vivo estas dek- ĝis kvindekfoje pli kara, komencante de la loĝ- kaj nutraĵprezoj ĝis la poŝt- kaj transporttarifoj. Kompare la salajroj estas apenaŭ trifoje pli grandaj ol antaŭe, tiamaniere ŝtatoŝtato-intelektulo apenaŭ povas vivi, senigante sin de multaj aferoj, al kiuj li kutimis kaj ne parolante pri vestaĵoj. Tiu ĉi estas preskaŭ neaĉetebla. Ekz. paro da ŝuoj, kiu antaŭe kostis 20 levojn, nun superas 500 l., kostumo, kiu antaŭe estis aĉetebla por 60 l., nun superas 2000 l. Kaj la salajro ekz. de gimnazia instruisto havanta familion ĝenerale apenaŭ atingas 1000 levojn monate. Al tio sin aldonas kiel krono la ĉiutage malaltiganta valoro de la bulgara mono. Nun bulgara levo, kiu antaŭe

egalas svisan frankon, valoras nur 4 sv. centimojn. . . . Kaj ĉar la lando estas agrikultura, la industrio pro manko de kapitalo ne tiel estas disvolvita. Do oni estas devigata importi multon, kaj ĉio (eĉ libroj) estas tre alte doganimpostata. Interese kaj strange estas, ke mankas seriozaj kaŭzoj, por ke Bulgario estu metata tiel malalte sur la internacia borso. Bazante sur la naturaj riĉaĵoj, laboremo kaj ŝparemo de la bulgara popolo, ni havas la plenan rajton eldiri, ke la situacio de nia valuto estas nek normala, nek pravigebla.

Feliĉe, la ŝtato sukcesis trakti kaj baldaŭ faros pruntojn en eksterlando (Francio kaj Belgio). De alia flanko la nunjara rikolto promesas esti unu el la plej bonaj. Laŭ la kalkuloj de kompetentaj personoj, la nunjara rikolto de cerealoj montras plialtigon meze de 30%, ne enkalkulante la difektajn kaŭzitaĵojn de la lasttempaj pluvegoj kaj hajlo. Tiamaniere la komuna kvanto de la cerealoj estos 3286 000 tunojn. Konservonte por la loka konsumado kaj por semo entute 1905 000 tunojn, la resto de 1381 000 t. estas por eksporto.

Krom tio por eksporto atendas jam kelkjaraj rikoltoj de tabako, rozoleo kaj kokonoj. Ĉe tiuj kondiĉoj ni rajtas esperi baldaŭan plibonigon de nia valuto, ĉar Bulgario kun siaj riĉaĵoj kaj la bulgara popolo kun siaj kvalitoj ne meritas esti tiel diskreditigataj.

Tiun ĉi jaron en tuta Bulgario estas farataj tre multe da ekskursoj, precipe de la lernanta junularo. Estas kvazaŭ epidemio ekskursi. La fervoja direkto faris ĝis la 15. junio 75% rabaton. Estis donataj eĉ specialaj vagonoj. Preskaŭ ĉiuj pitoreskaj landoj de Bulgario estas vizitataj, la Danuba ebenaĵo kun la historia urbo Pleven, la antikva ĉefurbo Tirnovo kun siaj vidindaj fosajoj, la admirinda marbordo kun la koketa Varna, la paradiza Roza Valo, la alpkarakteraj Rilo-montaro. . . Eĉ multaj societoj kaj fremdaj korporacioj aŭ grupoj vizitis ilin. Krom tiuj multaj koraclokoj kun mineralakvoj estas plenplenaj de vizitantoj. Oni eble ne scias, ke Bulgario estas unu el la plej riĉaj landoj kun mineral- kaj termal-akvoj, eĉ kiuj la gravaj estas: Panĉarevo, Pavel-Banja, Kortenska-Banja, Gorna-Banja, Varŝec, Hissara, Banki, Knjaŝevo, Lidjene, Cepino, Kosteneĉ kaj Dolnja-Banja.

Estas aranĝataj ankaŭ multaj lernantaj someraj kolonioj kondukataj de la instruistoj dum la monatoj julio-aŭgusto, la plej varmaj en Bulgario, kaj samtempe libertempaj por ĉiuj lernejoj. Tiamaniere la infanoj estas en pli proksima rilato kun la naturo. Forŝiritaj de la neafablaj domoj kaj polvaj stratoj de la grandurbaj dum la somera varmeco, sur la kampo je freŝeco, ili sin donas al ludoj kaj fizika edukado ligita kun la ritmo de la muziko kaj danco. Reveno al la antikvaj tempoj de beleco kaj ritmo, de la gracio kaj muziko! La infanoj fortikiĝas, la freŝa aĉero kaj la matena roso sur la herbo vigligas la organismon prematan de la vivo en la grandurbaj.

Iv. H. Krestanoff.

Recenzejo.

GAZETOJ.

ĈEĤOSLOVAKA GAZETO, kun NOVA EŬROPO. N-o 1. Praha, 15. julio. Esperanta Monata Revuo. Prezo po n-o 1 kĉ. Adreso: Praha II, Teŝnov 10.

Jen la kvara ĉsl. esp. gazeto, pri kiu ni jam aĉligis el „Progreso“ (vidu ET n-o 49). Tre aĉteptike ni atendis la specimenan n-on de tiu nova gazeto, sed — ricevinte ĝin — ni estis agrable surprizataj. La gazeto, en malgrandjurnalata formo, trikolora, havas plaĉan modernan aspekton; ĝi estas bone redaktata, ĝia enhavo estas esperanta, t. e. ne ŝovinista sed tolerema, paciga. Multaj komercaj anoncoj donas al ĝi certan seriozan karakteron. Speciale interesas la aldono „Nova EŬropo“, kiu estu „Internacia tribunalo de malgrandaj nacioj“. Ni deziras al la nova entreprenado ĉlan sukceson.

KRISTANA ESPERO. Majo-junio. Adreso: Lathia, Finnlando.

VERDA UTOPIO. Majo. Malaltigis abonprezon: eksterlando 1,70 yen, enlando 1,50 yen. Adreso: 5265, Uehommaĉi 7-Come, Minami-ku, Osaka, Japanujo.

Perditaĵoj.

Okaze de la XIII-a en Praha perdis: akceptejanoj sian kapon (pro la subita atako de mil specialvagonaranoj), ekskursanoj sian paciencon (en Brno), iu fraŭlino sian denton (ĉe bano en Moldavo), iu fraŭlo sian koron (al ĉastemularanino).

La honestaj trovintoj de la perditaĵoj objektoj estas ĝentile petataj skribi al la redakcio de ET pro perado. Premioj estas plezure donotaj.

Ekskurso al la Norda Poluso.

Dum la XIV-a Internacia Kongreso ni aranĝos unutagan ekskurson al la Norda Poluso. Por ke ni povu ĉion sufiĉe frue aranĝi laŭbezone, ni petas la partoprenontojn jam nun anonci sin ĉe nia sekretariejo; alie ni povas garantii por nenio.

L. K. K. Helsinki.

Estonia Esperantista Unuiĝo „Espero“

aliokligis de 1. aŭgusto ĉi-jare. Ĝia nova adreso estas: Tallinn (Estonio), Viru t. 16. La adreso por leteroj: Tallinn (Estonio), Postkast n-o 6, „Espero“.

Niaj novaj Abonprezoj.

Ni liveras al ne-germanaj landoj: 52 n-ojn (tuta jaro) por 100 germ. mk., 10 šil., 10 sv. fr., 20 fr. fr., 5 hol. guld., 10 skand. kr., 2 dolaroj aŭ 25 liroj (lirojn ni akceptas nur el Italio); 26 n-ojn (duona jaro) por duona prezo. Al Baliko kaj Balkano ni liveras 26 n-ojn por 25 germ. mk., al Polio 250 pmk., al Finnlando 25 fmk., al Aŭstrio 125 kr., al Hungario 75 kr., al Ĉeĥoslovakio 55 kr.

Oni pagu per monbiletoj aŭ bankĉekoj, sed ne per poŝtaviĝoj, ĉar la poŝto donas parte nur 2/3 de la kurza valoro.

La abonol povas esti komencataj per iu aln numero Germanaj abonulo ĉe la poŝto (poŝta gazetlisto, komplementoj 5 kaj 9); kvaronjare 15 mk.

Anoncoj

kosas po kvadracentimetro 1 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĝis 40% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%).

Anoncetoj

kosas por 1-2foja enpresoj kaj po 25 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET aŭ 5 germ. mk. aŭ 5 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (5 n-oj). Por 3-5foja enpresoj ni kalkulas la duoblon. Familiaj anoncetoj (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto) estas senpagaj.

Anoncetoj pri korespondo kaj interŝanĝo

kosas por 1-2foja enpresoj kaj po 15 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET aŭ 5 germ. mk. aŭ 5 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (5 n-oj). Por 3-5foja enpresoj ni kalkulas la duoblon.

Germanoj povas pagi monon al nia poŝtĉekkonto: Köln 70865 por Teo Jung, Horrem.

Anoncetoj.

FRAŬLO, 50jara, germ., judo, konata Esp-isto, deziras edziĝi je fraŭlino, 22-26jara, fremdlandulino, bona Esp-ino. Sciĝoj kun bildo sub „Edziĝo“ al la eldonejo de „ET“. Ambaŭ kondiĉo: diskreteco.

KIU SAMIDEANO povas prizorgi al mi okupadon en fremdlando? Mi finis antaŭ 11 jaroj komercan akademion, havas de tiu tempo bank- kaj fabrikspraktikon (el tio 4 jarojn en Ruusio), parolas boheme, esperante, germane, ruse, parte anĝle kaj pole. Afablaj proponoj je adreso: Vilém Černý, bankoficisto, Trebechovice, ĉe Hradec Kralové, Ĉeĥoslovakujo.

FIANĈIĜO. Stan fianĉigon anoncas l-ino Co en Paris kaj s-o Uea en Genève. Edziĝo okazos post esploro de la doto de l' fianĉino. Nian koran kondolencon!

Korespondo kaj interŝanĝo.

S-o W. Kaminski, Bydgoszcz (Polujo), Bocianowo 24, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn ilustr. bildfl.

Dankante al ĉiuj miaj gekorespondantoj mi sciigas ilin, ke pro la tro altaj poŝtelspezoj (k. 12 pmk., l. 20 pmk.) mi bedaŭrinde ne povas plu korespondi. S-o G. Tichocki, Bydgoszcz (Polujo), Zokietka 8 c II.

Tradukojn (preferable mallongajn) el la plej famaj naciaj poetoj kaj verkistoj interŝanĝas kun ĉiuj krom Anglujo, Ameriko, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Portugalujo Luigi Puppo, Via del Bragone 1-3, Genova, Sturia, Italio.

Triesto (Italio). S-o Camuffo Armando, placo G. B. Vico 9/II, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun gejunuloj.

S-o Josef Bierbauer, Sinabelkirchen ap. Gleisdorf, Stirio (Aŭst.), deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj, precipe kun komercistoj.

Korespondon per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun gesamideanoj el ĉiuj landoj deziras s-o Lois Bauer, oficisto, Ichendorf Bez. Köln, (Germ.), Glashütte.

Goewin Wisae, Hagen i. W., Böhmerstr. 45, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn ktp. kun samideanoj en la tuta mondo.

S-o Liudas Alseika, Šiauliai, Litovio, Pasaadna g-ve 19, interŝanĝas per poŝtkartoj (bfl.).

F-ino Eugenia Buinevičaitė, Šiauliai, Litovio, Stotes g-ve 8, interŝanĝas kaj korespondas per poŝtkartoj (bfl.).

F-ino Zofia Valcekauškaitė, Šiauliai, Litovio, Pasaadna g-ve 19, deziras korespondi per poŝtkartojn ilustritaj (bfl.).

Fritz Thiel, Swinemünde (Germ.), Seestr. 2, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartojn ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Oswald Kynast, Breslau (Germ.), Neudorfstr. 115-I-Gts, deziras korespondi kun alilandanoj per leteroj aŭ bildkartoj. Markoj bildflankaj.

Rudolf Welas (lernanto), Dux, Bohemujo, Bilinerstr. 549, deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. nur kun gekomercantoj.

Otto Weselmann, Dilseldorf (Germ.), Nordstr. 77, deziras interŝanĝi pensojn per leteroj kaj pk. li. kun gesamideanoj.

F-ino Maria Manzo, Via del Popolo 42, Potenza (Ital.) deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj per poŝtkartojn ilustr. kaj leteroj.

F-ino Cimarrusti Maria, Via Meridionale, Potenza (Ital.) deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj per poŝtkartojn ilustr. kaj leteroj.

F-ino Concetta Caffero, Via N. Riviello, Potenza (Ital.) deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj per poŝtkartojn ilustr. kaj leteroj.

Kiu sendos al mi 50-50 nesamajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da germanaj poŝtmarkoj. Hermann Wolfert, Instrulato, Menzelen-West, Rejnlando, Germ.

Romualdo Colivicchi

Skulptisto

VOLTERRA, TOSCANA, ITALIO.

Premiita laborejo por skulptaĵoj en

Castellina Marmoro
(Alabastro).

Specialaĵoj:

Polikromataj artist-laboraĵoj, lampoj, vazoj, objektoj por elektra iluminado.

Ĉiuspecaj artist-laboraĵoj estas ĉiam preparataj. Oni deziras agentojn kaj reprezentantojn en ĉiuj landoj.

Oni korespondas en Esperanto.

Poŝtmarkoj Nederlandaj.

Ĉiu, kiu sendos al mi minimume 200 da afrank utilaĵoj, kamp-poŝtoj, aer-poŝtoj, poŝtmarkoj de sia lando, ricevos de mi saman kvanton da holandaj poŝtmarkoj. Skribu legeble vian adreson.

S-o C. D. de Smet, Noorddijk 60, Worme: v. der, Holando.

7^a Internacia Foiro de Breslau

Aŭtuna Foiro :: 4-a ĝis 8-a de Septembro 1921.

Teksaĵoj, ledaĵoj, ŝuoj, ornamaĵoj kaj armetiaj objektoj, meblaro, pormaŝtrud-artikloj, sportbezonaĵaro, papero kaj paperaĵoj, kontor-uzaĵaro, manĝaĵoj kaj ĝuajoj, kemiaj- teknikaj artikloj.

Informojn donas:

Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

ESPERANTO-FAKO

BRESLAU I (Germ.), Ohlauerstr. 87.

Franco

kun bonaj referencoj komercaj deziras **reprezenti en Paris**

eksterlandajn firmojn pri ĉiuj

komercaĵoj

kaj produktoj. Donos komercajn informojn pri francaj komercaĵoj. Perfektaj diskreteco kaj honesteco.

Adresu ĉion al

S-o Emile Béchet

28, rue Leroyer, Vincennes (Paris).

Natur-Teatro (Tagluma Scenejo) Freiburg i. Br.

(200 m. larĝa, 100 m. profunda, la plej granda en la mondo).

PASIO-FESTLUDOJ

laŭ la originalteksto de Oberammergau sub gvidado kaj kunefiko de la famekonataj bavaraĵ Kristo- kaj Judas-prezentoj Adolfo kaj Georg Fassnacht.

Ludotagoj de 16. julio ĝis fino de sept., ĉiun merkredon, sabaton kaj dimanĉon.

1500 kunefikantoj.

Korusoj. — Orkestro. — Granda Orgeno. Muzika gvidado: Franz Philipp.

La tribuno por la spektantoj enhavas 9000 lokojn.

Prospektoj pri enirprezoj kaj loĝejoj estas riceveblaj de la centrejo

B. Gotthart, Kaiserstr. 132, tel. 879.

La Festluda Direkcio.

Libra kaj Arta Presejo

Emil Friedr. Adolph

Fond. 1888. Hassloch (Palatinato) Telef. 58.

Fabrikado de bonkvalitaj artpresaj prospektoj kaj de ĉiuj presaĵoj por komercio kaj industrio en ĉiuj eŭropaj lingvoj, inkluzive Rusa kaj Esperanta.

Oni petu oferton.

Korespondado: Esperanto, Angla, Franco, Germano ktp.

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof kaj la funebra ceremonio.

Valora memoraĵo por ĉiu esperantisto.

Presita sur arta papero.

Kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografaĵoj.

(Funebra procesio sur strato Teatrajna. — Sur la Tombejo. — Enterigo de la ĉerko. — Paroladoj de la predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grabowski kaj de majoro Neubarth. — La tombo, novaj fotoj de aprilo 1921.)

Prezo de la verketo 15 germ. mk.

Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“, Köln-Horrem.

Plej malkaraj esperantaj libroj:

	germ. mk.	
Kabe, Internacia Krestomatio	6.—	
Belmont, Sonoj esperantaj	5.—	
Stenkiewicz, Kio okazis foje en Sidono	2.—	
„Ni sekvu Lin“	5.—	
Reymont, En fumo de l' opto	5.—	
Fredro, Consilium facultatis	4.—	
Div. aŭtoroj, Kelkaj noveloj	5.—	
Grabowski, El Parnaso de Popoloj	10.—	
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1908	10.—	
Bela Manto, La dorna karesilio	4.—	

Riceveblaj ĉe

Ksaw. Alfus, Tarnow (Pol.), Wied. Bank Zwiask,

kontraŭ sendo de mono en rekom. letero.

Hungara Ĝenerala Kreditbanko Budapest

La plej granda hungara banko kun interrilatoj en ĉiuj landoj.

Akcia kapitalo kaj rezervofondoj: hung. kr. 9000000.

Kvin filioj en Budapest.

Filioj en: Brasso, Debreczen, Fiume, Győr, Kassa, Kecskemet, Nagyvarad, Pecs, Pozsony, Satoraljaiújhely, Szabadka, Temesvar.

5^a Internacia Foiro de Frankfurt m.

25. septembro ĝis 1. oktobro 1921.



Importo. 30 branĉoj. Eksporto.



Presajoj en germana, angla, dana, franca, hispana, itala, nederlanda, norvega, sveda kaj esperanta lingvoj.

„Antaŭ-Katalogo“ kun plurlingva kaj esperanta registro, „Listo de Komerciaĵoj“ en Esperanto.

Detalajn informojn petu tuj de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt m. Germ.